



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Gvidilo por la eksteraj rilatoj

La graveco

De la komenco de ILEI, unu el ĝiaj ĉefaj celoj estis prezenti la ligon en deca maniero inter aliaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj kiuj okupiĝas pri lingvo-instruado. Tio estas fekunda kaj ampleksa kampo, kiun ILEI en lastaj jaroj apenaŭ tuŝis pro akuta manko de rimedoj kaj homoj kapablaj en tiu medio. Lastatempe eĉ ne ekzistis estrara posteno pri la eksteraj rilatoj. La Interna Regularo postulis (absurde) ke la prezidanto prizorgu la eksterajn rilatojn. Principe bona ideo, kaj se ĉio interna glate kaj efike funkcias, eĉ realigebla. En Kunmingo ni modifis la regularon tiurilate; evidente la prezidanto havas finan respondecon pri eksteraj elpaŝoj (kiel pli ĉio en ĉiu kampo), sed malrealismas imagi ke la prezidanto prizorgas la detalan laboradon. Sekve en Kunmingo, ni kreis estraran postenon pri la fako.

La nuna stato

ILEI konservas membrecon kun praktike nur FIPLV (Federacio Internacia de Instruistoj de Vivantaj Fremdaj Lingvoj). Pro manko de laborfortoj, tio limiĝas al plusendo al koncernaj sekcioj kelkajn el la ricevitaj mesaĝoj (plimulto restas eĉ ne malfermitaj), kaj la prizorgo de reprezentanto de ILEI partopreni iujn aranĝojn de FILPV (internaciajn aŭ naciajn). ILEI havis reprezentanton foje en kusidoj de la litovia sekcio de tiu organizo, kaj en junio 2012 la Ligo estis reprezentita en ilia tri-jara Monda Kongreso en Finnlando.

Ni havas teamon ĉe Unesko, kiu foje aktivas en la Pariza sidejo, kaj kiu ĉiun trian jaron prezentas sin, kunlabore kun UEA, en la Ĝenerala Konferenco de Unesko (laste en oktobro 2011). Ni havas komisionon pri rilatoj kun Unuiĝintaj Naciaj – UNICEF, Rio +20 ktp, sed konkretaj projektoj ankoraŭ devas naskiĝi.

Pro la KER-ekzamenoj, ILEI havas iajn rilatojn kun ALTE – La Europa Asocio de Lingvo-Testantoj. Tio pli-malpli fermas la liston.

La bezono – trovi partnerojn

Unuhora reta esploro sufiĉus por trovi kvardekon da internaciaj organizoj, kun kiuj ILEI povus utile starigi rilatojn, kun ĉiam la eblo, ke niaj sekcioj starigu rilatojn kun la naciaj filioj de tiuj organizaĵoj. Evidente, ILEI havas nek laborfortojn nek financajn rimedojn kunlabori kun dekoj da organizoj, sed el la longa listo, devas ebli elekti kvin-ses, kiuj plej fruktodonus, kaj je kiuj ni koncentru niajn fortetojn. Poste necesas pli bone informiĝi pri la eksteraj rilatoj en la sekcioj, kaj trovi homojn kun emo kaj kapablo labori tiuterene kaj formi ilin en laborgrupon aŭ komisionon.

La bezono – regule interagi

Nia komisiito/estrarano devas forgesi pri niaj belaj revoj pri lingva egaleco, kaj kompreni, ke por rilati kun internaciaj organizoj ni devas uzi la momentajn potenclingvojn. Do kapablo legi kaj iom paroli la anglan pli-malpli estas devigata, kun la franca, germana, hispana aŭ ĉina dezirindaj –La tasko minimume bezonas:

- agnoskon de ricevitaj dokumentoj, kaj plusendon de tiuj, kiuj utilas al ni al koncernaj sekcioj. Reala ekzemplo: la ĉeĥa filio de FIPLV okazigis eventon en Prago. Ni almenaŭ sciigis tion al la ĉeĥa sekcio, kun rekomendo pri partopreno.

- notadon de venontaj eventoj de la partneroj, kaj laŭeble aranĝon de partopreno, se eble per prelego aŭ prezentaĵo, aŭ minime afiŝo kaj budo. Kio siavice devigas buĝetan disponigon ekde 2013 por eksteraj rilatoj.
- establon kaj flegon de personaj kontaktoj kun gravaj homoj en tiuj organizoj, por starigi la bazon de kiu estonataj komunaj projektoj estus planeblaj.

Uzado de la nova retejo

La nova multlingva retejo <ilei-mondo> estis aprobita antaŭ pli ol jaro. La bazo estas starigita kaj materialo enestas en kelkaj lingvoj. Sed drasta manko de homfortoj signifas, ke ĝi ankoraŭ ne estas matura por publika malfermo. Ĝi efektive bezonas teknike kaj redakte kapablajn homojn, kiuj ne jam en la ligo aŭ la movado estas superŝutitaj de aliaj taskoj. La retejo plenumos multajn bezonojn, sed precipe por la eksteraj rilatoj. La celo estas krei alispecan retejon ol la nuna – tre utila kaj valora – interna Esperant-lingva retejo. La Esperanta parto de la nova retejo celos prezenti la Ligon kaj Esperanton al ekstera publiko. La nacilingvaj partoj similos al la Esperanta parto, sed ne nepre identos kun ĝi. Eblecoj por antaŭenigi la eksterajn rilatojn multas:

- Starigi sekcion pri ĉiu faka organizo, kun kiu ni havas rilatojn. Tie ni deponos nacilingvajn dokumentojn kiujn ni ricevos de tiuj organizoj, sen la nepra devigo traduki ilin en Esperanton kaj svarmon da aliaj lingvoj. Nuntempe multaj komunikoj de FIPLV estas plusendita al nur tre limigita rondo, nur pro la manko de rimedoj tradukigi aŭ resumi ilin en Esperanto. La nova retejo povos formi integran parton de la kunlaboro inter ILEI kaj diversaj eksteraj instancoj.
- Aperi informojn pri niaj projektoj, ekzemple pri lernejoj interŝanĝoj, por ke neesperantistoj rekonu la eblan utilon de Esperanto aŭ por sia propra valoro, aŭ pro propedeŭtika valoro, aŭ kiel organiza/faciliga lingvo en transnaciaj projektoj, aŭ kiel perilo por lingva konsciigo de lernantoj.
- Aperi nacilingvajn artikolojn kaj dokumentojn pri lingva egalrajteco, kazoj de diskriminacio, kaj ĉio, kio tiras la atenton al la egaliga kontribuo de Esperanto al la komunikado.

En la nova estrar-mandato (2012-2015)

Ni nun havas estraranon pri eksteraj rilatoj. Tiu raportu regule al la prezidanto kaj kunlaboru, pro tiu regulara devigo. La tasko estas realigi tiom el la supre skizitaj ideoj (aŭ aliaj) kiom eblas.

Specifa komenca taskaro:

1. Pretigu katalogon de internaciaj kaj naciaj edukaj instancoj. Enhavu la precizan nomon, la emblemon, ilian retejan adreson kaj retpoŝtan kontaktadreson. Aldonu 2-3-linian resumon pri la celaro, se tio ne memevidentas. Indiku ĉu ilia retejo havas interaktivan parton, kie eblas enskribi komentojn, aŭ anonci eventojn, ekzemple sur mapo. Indiku en kiuj lingvoj aperas la paĝaro.
2. Pretigu liston de retadreso, uzablaj kiam ILEI volas dissendi komunikojn celataj al tiaj organizoj.
3. Akiri publikajn dokumentojn de tiuj asocioj por afiŝigo en nia multlingva retejo <ilei.mondo>
4. Kontakti niajn landajn sekciojn kaj malkovru kion ili faras pri eksteraj rilatoj. Informojn vi povos ĉerpi en la raporto de la sekcioj por 2011 (en www.ilei.info) sub 'Instancoj>Sekcioj'.
5. Raporti pri ĉiuj elpaŝoj: membrigo en asocioj, partopreno en eventoj ks.

Verkis: SMG, Herzberg, 24an de majo, 2012.

En la volontula apartamentejo, super la fajrobrigada stacio.

Revizio: 28an de Sept, 2012 SMG kun aldono de taskaro ekde 2012.